

Parto 6:

Interlingua (IALA)



INTERLINGUA (IALA/Gode) en Svislando

La apero kaj evoluo de la dua plej signifa naturalisma planlingvo post Occidental-Interlingue, nome Interlingua (Il.) publikigita de Alexander Gode-von Aesch (1907-70) en Novjorko en 1951, estas ligita kun la laboro de *International Auxiliary Language Association in the United States* (→IALA). La ĉefa referenco de Il. estas la fundamenta vortaro *Interlingua-English Dictionary* (New York 1951). Post la likvido de IALA en 1953 Alexander Gode fariĝis estro de Il. Division of Science Service en New York ĝis 1967.

En multaj rilatoj Il. similas al Occidental-Interlingue. Sed ĝi estas ankoraŭ pli naturalisma, pli latinida. La ĉefaj lingvistikaj karakterizoj de Il. estas ĝiaj malregulaj vort-familioj, natura kaj neregula derivadoj, abundaj neregulaj afiksoj, konservado de la historia ortografio, la polisemio. Fakte Il. estas majstre ellaborita sistemo, kiu naskiĝis kiel rezulto ne de funkcie, sed de etimologie orientitaj lingvistikaj kaj lingvo-filozofiaj kredoj.

Post sia publikiĝo Il. atingis ioman signifon en la internacia komunikado. En la 1950-60aj jaroj ĝi estis aplikata precipe kiel lingvo por resumoj en sciencaj, precipe medicinaj periodaĵoj. Diversaj sciencaj revuoj aperis parte aŭ tute en Il. Nuntempe iuj aktivuloj de Il. ekzistas ankoraŭ ekzemple en Nederlando (Union Mundial pro Interlingua UMI) kaj en Britio (British Interlingua Society). La internacia adresaro de Il. nombris en 1975 190 personojn el 23 landoj. En Svislando estis registritaj ok personoj (kompare kun 17 en 1964).

La ĉefaj protagonistoj de Il. en Svislando estis →Hugo Fischer, →André Schild kaj precipe →Ric Berger. La historio de ilia aktiveco formas samtempe la historion de Il. en Svislando.

En 1962 Alexander Gode, kies patro estis nordgermano kaj la patrino svis-devena, restadis en Svislando kaj vizitis Fischer en Escholzmatt kaj Schild en Basel. Alia renkontiĝo okazis en Bern kun Fischer, Berger kaj →Fred Lagnel, kiu restis ĉe Interlingue-Occidental, sed aktive partoprenis precipe la

denuncan polemikon kontraŭ Eo post ĝia rezolucia agnosko far Unesco en 1954 (la aprila-junia numero 1972 de *Currero* estis dediĉita al Unesco). Internaciaj konferencoj de Il. en Svislando okazis en 1957 (3-10 de aŭgusto) kaj 1971 (24-27 de julio) en Basel.

La fondinto de *Fundation Bakonyi pro Lingua Universal*, inĝ. Stefano Bakonyi (1892-1969), kiu loĝis en Bordighera (Italio), estis kemiisto kaj industria konsilanto de hungar-itala deveno. Per sia fondaĵo, kiu estis starigita en Schüpffheim/LU la 9an de septembro 1969, kaj kun sia verko *Civilisation e Lingua Universal* Bakonyi celis la apogon de Il.-eldonaĵoj flanke de la ekonomio. Post la morto de Hugo Fischer (1978) Schild transprenis la prezidon de la fondaĵo. Kaj post la forpaso de Schild la nova prezidanto de la fondaĵo fariĝis d-ro Johann Albisser en Basel. La unuan de januaro 1990 la prezidanto de la fondaĵo Bakonyi pro Lingua Universal fariĝis →Paolo Castellina (*1952), kiu restis la sola aktiva reprezentanto de Il. en Svislando.

→Tazio Carlevaro tradukis en Il. la sekvan-tajn verkojn de la itala aŭtoro Carlo Goldoni: *Le familia del antiquario*. Komedio en Occidental ed en Interlingua. Kun introdukto kritika e istoriala. (1980, 2ma edit. 1993; en Occidental kaj Il.), kaj *Le albergatrice* (1995, 2a ed. revisata 1998). En 1991 Paolo Castellina aperigis kun Hugo Pellegrini kaj Tazio Carlevaro ĉe *Union Interlingua de Helvetia* la 267-paĝan itallingvan libron *Interlingua – lingua internazionale. Principi di base, grammatica, vocabolario italiano-interlingua, sussidi per l' uso.* (→Bibliografio)

En 1986 la retoromanĉa ĉeforganizo Lia Rumantscha tradukis broŝuron pri Il. en la romanĉan lingvon (laŭ *Currero* 83/1986).



Alexander Gode

Interreto:

<http://www.interlingua.dk>

<http://www.interlingua.com/historia.htm>

Ric (Richard) BERGER


1894-1984



B. naskiĝis en familio kiel unua de dek infanoj. La bazan lernejon li trapasis en Mont-sur-Rolle/VD, la duagradan en Herzogenbuchsee/BE. Post la porinstruista kaj belarta lernejoj kaj studoj pri oleo-pentroarto en Lausanne/VD sub la gvido de la friburgaj pentristoj Buchs, Oswald kaj Vonlanthen, B. instruis artan kaj dekoran desegnadon kaj arthistorion en la mezlernejoj de Corcelles-près-Payerne/VD, Aubonne/VD kaj Morges/VD (1928-63), kie li loĝis dumvive. Sur tiuj kampoj li akiris bonfamon, kreante plurajn inkodesegnajn artverkojn kaj redaktante dudekon da popularaj fakaj kaj ĝeneral-klerigaj lernolibroj pri desegna didaktiko, pri vaŭda kaj svisa arthistorio, kiuj aperis parte en renomaj eldonejoj de Svislando kaj Francio. Krome B. estis sekretario de Internacia Asocio de la instruistoj pri desegno kaj arthistorio.

B. apartenis al la plej multflankaj kaj sensaciaj planlingvistoj kun internacia signifo. Laŭ propra aserto B. estis varbita al la ideo de la neŭtrala universala lingvo sub la influo de →Auguste Forel en 1909. Ekde 1912 B. okupiĝis pri Eo, kunlaborante kun la redakcioj de diversaj periodaĵoj kaj kiel delegito de UEA. En 1918 li forlasis Eon, kritikante ĉefe ĝiajn supersignojn, kaj aliĝis al la Ido-movado, kie li aktive adeptis dum jardeko. La transiro de pluraj, ĉefe romandaj idistoj al →Occidental-Interlingue okaze de la fondo de SAPO en 1928 absorbis ankaŭ la idiston B. En la lingvo-

voprojekto de Edgar von Wahl li kredis esti trovinta la konfirmon de siaj ideoj pri la 'lingua franca' por parolantoj de latinidaj lingvoj. Dum multaj jaroj B. influis la svisan Occidental-movadon kiel ties 'spiritus rector', elstarante kiel unua prezidanto de SAPO (ĝis 1933), kiu pli malfrue nomis lin honora membro. Li redaktis la gazeton *Svissia* (poste *Helvetia*) kaj verkis sennombrajn artikolojn, studojn, lernolibrojn ktp., kunredaktis la revuon *Cosmoglotta* (1934-50), kunlaboris kun Societe Cooperativ del Occidental-Edition (SCOED) kaj en 1942 fariĝis vicprezidanto de Occidental-Union. Sub lia esenca influo, en 1948/49 Occidental adoptis la nomon Interlingue.



Broŝuro el la Ido-periodo de Berger, 1919

Lia rilato kun IALA, kie li reprezentis la movadon Occidental-Interlingue, unue estis karakterizita de skeptiko kaj kritiko, ĉar B. suspektis tro fortan influon flanke de la e-istoj en ĝi. Kiam la laboro de IALA progresis en la direkto de la naturalisma skolo en planlingvistiko, des pli lia favoro pri ĝi kreskis. Kon-

vinkita pri la supereco de la naturalismo en planlingvo(j), fine de 1956 B. aliĝis al Il., kiu estis proponita de IALA kaj de Alexander Gode jam en 1951. Ĉi tiun lian decidon influis ankaŭ lia opinio, ke nur profesiaj lingvistoj kiel tiaj en IALA kapablas havigi la ĝustan planlingvan solvon. Sekve B. iĝis la ĉefa motoro de Il. en Svislando kaj ankaŭ internaciskale kun la sekvantaj funkcioj: redaktoro de *Currero International* (1951-66), ĝenerala sekretario de UMI (1959-63) post →André Schild kaj multjara sekretario de Union Interlingua de Helvetia. En 1962 li establis sian propran eldonejon Editions pro Interlingua kun sidejo en Morges, kie li, helpe de la asistantino Colette Bride, ofsete produktis multnombrajn eldonaĵojn kadre de la serio Collection pro Interlingua. La redaktado de *Revista de Interlingua* (1966-83) inaŭguris novan periodon en la agado de B. Pli ol 6000 paĝoj A4 de tiu revuo estis ekspeditaj al 60 landoj, kaj pli ol 120'000 ekzempleroj da libroj aŭ broŝuroj kaj informiloj aperis de li en Il. Konsiderata de multaj kiel posteulo de Gode, B. elstaris ankaŭ kiel rimarkinda polemikulo kontraŭ aliaj planlingvoj. Legindaj estas liaj akraj artikoloj unue kontraŭ la idisto Louis de Beaufront (verkitaj kiam B. estis occidentalisto), poste kontraŭ →Alphonse Matejka (kiam B. estis ano de Il.). Kvankam B. bonege regis la lingvon Occidental, li ĝenerale preferis uzi la francan lingvon, precipe buŝe, sed ofte ankaŭ skribe, por eviti la eraran uzadon de Il. Almenaŭ el lingva vidpunkto, lia transiro de Occidental al Il. signifis veran problemon. B. mem bone konsciis pri tiu handikapo kaj ankaŭ ofte aludis ĝin. La vaŭda gazetaro omaĝis lin en 1984 okaze de lia morto.

→Ido →Occidental-Interlingue
→Bibliografio →Antologio



Ric Berger, 1970

Paolo CASTELLINA

*1952. Loĝas kaj laboras en Borgonovo GR kaj Stampa GR



C. estas ital-devena pastoro de la protestanta eklezio de Grizono. Kiel filo de polica oficiro (Carabiniere) C. vizitis la lernejon en Cuneo, sude de Torino (cetere la patrujo de Giuseppe Peano, aŭtoro de Latino sine flexione), finante ĝin per diplomo de geometro. Post kiam li kunlaboris kelkajn jarojn kun sia patro, li forlasis la policon kaj fariĝis privata detektivo. Lia familio devenas de la romkatolika tradicio, sed C. estis altirata de la protestanta reformacio kaj, ravita pri la interpretado de la biblio far la protestanta evangelio, li decidis servi kiel protestanta pastoro. En Svislando li studis en internacia teologia seminariejo baptista apud Zŭrich, kies instrulingvo estis la angla. Kvar jarojn poste li posedis la licencion pri teologio. Post tio li alvenis en la valo de Bregaglio en Grizono, kie li renkontis sian ontan edzinon Ruth, kun kiu li havas tri infanojn. La teknikaj aferoj, informadiko, komputiloj, interreto, kiel ankaŭ la lingvistiko kaj interlingvistiko ĉiam restis liaj ŝatokupoj.

C. lernis unue Eon kiam li havis 16 jarojn, sed poste malkovris Il., kiun li ekpreferis. La 1an de januaro 1990 C. fariĝis prezidanto de Fundation Bakonyi pro Lingua Universal, establita de Stefan Bakonyi. Ekde tiu tempo C. tradukas la biblion en Il., precipe la novan testamenton surbaze de la origina lingvo, ekde 1987 publikigante la periodaĵon *Pro Biblia*, kiu aperas en elektronika formo interreta. La prononc-fakulo C. estas la svisa reprezentanto de UMI; li funkcias kiel sekretario de Union Interlingua de Helvetia.

→Bibliografio

Hugo FISCHER

1901-1978



Post medicinaj studoj ĉe la universitatoj en Lausanne, Roma, Wien kaj Zürich F. fariĝis asista kuracisto en Winterthur/ZH, Schatzalp/GR kaj Leysin/VD kaj ekde 1934 vivis kaj laboris kiel kuracisto pri interna medicino en Escholzmatt/LU. Tie li elstaris kiel multifacete funkcianta kaj socie engaĝita homo, cetere ankaŭ kiel adepto de la liberekonomia teorio de Silvio Gesell. Lia medicina studado, lia admiremo de la romkatolika eklezio kaj la spertoj dum liaj vojaĝoj inter la nordaj landoj kaj Sudameriko (kiel ŝipkuracisto) kontribuis al lia konvinko, ke la homaro devas posedi neŭtralan universalan lingvon. Kiel konanto de la latina kaj de latinidaj lingvoj la lucernano kredis, ke tia mondlingvo devus fondi en la „latin-ibera” koncepto. Eo ŝajnis al li tro artefarita. Iam adepto de Ido, komence de la 1950aj jaroj F. transiris al Occidental-Interlingue kaj fariĝis komitatano de SAPI (1953-55). La 1an de aŭgusto 1957 li proklamis sian aliĝon al Il. de Alexander Gode/IALA, kiun li taksis pli promesplena planlingvo, ĉar ankoraŭ pli latineca ol Occidental. Sekve li vigle propagandis ĝin i.a. ĉe la svisa rotario-klubo. En la dua internacia kongreso de Il. en 1957 en Basel F. estis nomita konsilanto de UMI kaj gvidanto de ĝia scienca sekcio. F. estis ankaŭ prezidanto de ĝia svisa Il.-sekcio (1966). Post la morto de Stefan Bakonyi en 1969 F. fariĝis prezidanto, en 1979 honora prezidanto de Fondation Bakonyi pro Lingua Universal. F. pledis por la enkonduko de la t.n. „Euro-Interlingua“ anstataŭ la latina lingvo en la t.n. integritan Eŭro-gimnazion (Gymnasium Europaeum),

kiu laŭ lia opinio devus esti la reformita gimnazio de la estonta Eŭropo. Lia espero, ke la romkatolika eklezio adoptos la „modernan, vivantan latinon“ (t.e. Il.) en siaj institucioj, tamen restis vana. F. simple proklamis Il. de Gode kiel la plej bonan kaj definitivan mondhelplingvon. La naturalisman, latinidan mondlingvon li defendis ne nur en sia ampleksa privata korespondado, sed ankaŭ en siaj multnombraj cirkuleroj.

→Bibliografio →Flurin Maissen (→Occidental)

REVISTA DE INTERLINGUA

Ĉefa Il.-periodaĵo eldonita en Svislando. Ĝia redaktoro nomiĝis →Ric Berger en Morges. R. aperis 1966-83. En ĝi estis publikigitaj multaj ilustraĵoj, kiujn Berger mem desegnis. Aliflanke la valoro de la tekstoj mem estas iom dubinda.

→Bibliografio (gazetaro)



Eldono de *Revista de Interlingua* el 1980 kun desegnaĵo de Sierre far Ric Berger

André-Philippe SCHILD

1910-1981



En 1941 la neŭŝatelano S. transloĝiĝis de Neuchâtel al Basel por labori kiel instruisto en la lingvolernejo Bénédict. Li ankaŭ instruis stenografion. Li same bone regis la italan, germanan, anglan lingvojn kiel li brile konis la klasikajn lingvojn latinan kaj grekan. S. frekventis la duagradan lernejon en Cernier/NE, kie lia instruisto →William Perrenoud okazigis Eo-kurson, kiun S. sekvis por poste perfekte ĝin ellerni kaj akiri la diplomon por instrui Eon. Tiel S. fariĝis tre sindonema e-isto, kiu iris labori ĉe la sekretariejoj de UEA kaj ICK en Ĝenevo (kie li bedaŭrinde ekkverelis kun Robert Kreuz, kies lingvuzon tro germanecan kaj atistan li kritikis). 1934-40 S. prezidis la bazelan EG. Iom post iom S. distanciĝis de Eo, sentante sin pli altirita de la naturalisma skolo en planlingvistiko. Li aliĝis al la Occidental-movado kaj membriĝis en SAPO (ĉ. 1930), transprenante la gvidon de Oficie por li lingue international auxiliari Occidental. Ĉar Occidental kaj Latino sine flexione tamen ne kontentigis liajn naturalismajn imagojn, en 1947 li publikigis sian propran planlingvan projekton, kiu nomiĝis →*Neolatino*, kun la celo evoluigi la naturalismon en planlingvo(j). Kiam en 1951 aperis la fundamenta vortaro Il.-angla (IALA), S. forlasis sian propran sistemon, en kiun li investis tiom multe da energio kaj mono, favore al la nova lingvo, kie li restis adepto dumvive. En 1954 li publikigis *Circular al Cognoscitores e amicos de Interlingua*, en kiu li anoncis la fondon de Union Mundial de Interlingua (UMI), kvazaŭ kiel postsekstanta organizo de IALA. En UMI li rolis kiel

direktoro, poste kiel ĝenerala sekretario, apud Gode kiel prezidanto, kaj membriĝis en ĝia Consilio Autonome. En la sama jaro li eldonis sian kurson por franc- kaj germanlingvanoj. En 1955 UMI komencis eldoni la modestan, sed regulan periodaĵon *Le Currero del Mundo*, kiu estis administrata de S. kaj en kiu aperis liaj modelstilaj artikoloj pri interlingvistiko. En 1957 li organizis la duan kongreson de Il. en Basel (1957) kaj en 1972/73 transprenis la sekretariadon de Comision Linguistic de Il.-Union (Amsterdam). Poste li demisiis kiel ĝenerala sekretario de UMI por koncentri siajn fortojn al siaj vortaroj *Interlingua-Germana kaj Germana-Interlingua*.

Pri la rilatoj inter la anoj de Il. kaj Occidental, →Claude Gacond, kiu bone konis kiel atestanto tiujn rilatojn, rakontis jenon: „Dum siaj ferioj S. instaliĝis en Les Hauts-Geneveys/NE kaj tagon post tagon venis helplabori ĉe CDELI, parolante nur en Eo. Tiam lia kontraŭ-esperantismo iom ĉesis, ĉar S. multe admiris la vortkreatan kapablon de Eo. Post la bazela kongreso li pli kaj pli dubis pri la estonta sukceso de Il., kaj tial liaj rilatoj kun →Alphonse Matejka, kiu ankaŭ pli kaj pli dubis pri la estonteco de Occidental, fariĝis amikaj. Kun Matejka S. respektive parolis en Occidental. Sed la kunlaboro inter S. kaj →Ric Berger ne estis harmonia, same kiel inter S. kaj →Hugo Fischer la rilatoj estis tre streĉitaj. S. devigis tiujn du Il.-anojn paroli en Il. kaj kutimis rimarkigi al ili iliajn erarojn per kruda kaj sarkasma tono. Tio klarigas, kial en Svislando Ric Berger laboris indvidue, kaj kial la svisa asocio por Il., kies fandan kunvenon mi partoprenis, ne povis funkcii. Neniu sento de amikeco regis inter la svisaj Il.-adeptoj, kaj estas fakto, ke iom post iom iliaj nuraj renkontoj okazis en CDELI. Tiam Ferdinand Haller provis krei kunlaboran etoson, sed li ne sukcesis en siaj provoj. Kontraŭe inter la occidentalistoj regis pli forta amikeco, tre verŝajne dank’ al la personeco de →Fred Lagnel. Inter la idistoj ankaŭ regis forta amikeco, kondiĉe ke la kverelema bernano Hans Cornioley ne kunestu. Kun mi tiuj adeptoj de la diversaj planlingvoj ĉiam kondukis tre amike kaj ankaŭ ofte malavare. La plej malavara estis S. mem (kiu heredigis postmorte sian bibliote-

kon al CDELI).“


→ Neolatino (→ Interlingvistiko) → CDELI → Bazelo
→ Bibliografio → Antologio



Staras André Schild (Basel 1971), apud kiu sidas Claude Gacond



Gacond, Fischer, Schild (Basel 1971)
(fotoj www.interlingua.com)



Interlingua-kurso de André Schild. Desegnaĵo de Ric Berger (St. Saphorin/VD).



Alice Morris, fondintino de IALA. Desegnaĵo de Ric Berger